

## Biografia noto pri Li Weilun



Li Weilun (1936- ), ĉino, profesoro de Pekina Lingva kaj Kultura Universitato. En 1979 eklernis Esperanton. De 1980 ĝis nun li instruas Esperanton en PLKU kaj en aliaj lokoj. En 1983 li eldonis lernolibrojn *Elementa Esperanto Kurso* (2 volumoj). En 1999 li partoprenis en kompilado de *Esperanto en Ĉinio dum Cent Jaroj*. En 2001 li partoprenis en kompilado de *Skiza Historio de Ĉina Esperanto -Movado*. En 2005 li kompilis lernolibrojn *Moderna Esperanto* (2 volumoj) kaj en 2007-2010 kompilis lernolibrojn *Moderna Esperanto por Infanoj* (4 volumoj)

S-ro Li estis prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, Konstanta Komitatano de Ĉina Esperanto-Ligo, vicestro de Ĉina Sekcio de ILEI Kaj vicestro de Ĉina Societo de Esperanto-Instruado en Superaj Lernejoj. Li aktive kaj multjare partoprenas en Esperanto-aktivado kaj kelkfoje gajnis premiojn de Ĉina Esperanto-Ligo.

La Estraro de ILEI transprenas la proponon de la ĉina sekcio de ILEI, ke s-ro Li Weilun fariĝu Honora Membro de la Ligo kaj pludonas ĝin al la Komitato por trakto en Kunmingo.